
# *Pli ol 200 personecoj tra la mondo denuncas subfosajn agojn de Usono en Kubo*

*Image not found or type unknown*



**Bildo / Radio Bayamo**

Parizo,  nov 10 (RHK) La registaro de Va?ingtono asignas milionojn da dolaroj por interna subfosado en Kubo, alvokante al civila malobeo, anarkio kaj kaoso, denuncis  pli ol 200 personecoj el la tuta mondo en publika deklaro.

La subskribintoj indikis, ke por ?i tiu tasko la usona ekzekutivo havas "la kunkulpecon de la granda kompania gazetaro", kaj kun "individuoj  el Florido, ?efe, kiuj organizas kampanjojn kiuj vokas eliri al la stratoj por protesti perforte por renversi  la kuban registaron”.

Anka? en la interno de la insulo estas grupoj kaj "uloj, kiuj sentas sin subtenataj kaj protektataj de Va?ingtono", kiuj, profitante "la malfacilan ekonomian situacion pro la blokado (situacio pliigita de Kovim-19, kiel en ?iuj aliaj nacioj), alvokas al subfosaj manifestacioj ”kun la sola celo fini la nunan politikan sistemon, la? la dokumento.

El la jura vidpunkto, la subskribintoj memoris, ke ?i tiuj agoj estas farataj kontra? la kubaj le?oj “kiuj malpermesas ?ian atakon kontra? la nuna politika sistemo, kiel estas logike en ?iuj ?tatoj de la mondo. Kaj multe pli kiam ?i estas instigita de fremda potenco.

La? tiu ?i linio, ili atentigis al la usona registaro, ke Kubo neniam faris “agojn kontra? ?ia sekureco, des malpli  enmiksi?is en ties internajn aferojn, nek alvokis la usonajn civitanojn subfosi la establitan ordon, malgra? la multoblaj kaj seriozaj internaj sociaj problemoj,  kiujn tiu ?i mondpotenco havas”.

Por ?io ?i, ili postulis, ke Va?ingtono "?esigu la nehoman blokadon kontra? Kubo, kaj ?esu ?iajn provojn malstabiligi la landon", kies celo estas nenio alia ol "sufoki la kuban ekonomion kaj ka?zi suferon al ?ia lo?antaro por ke ?i ribelu kontra?  la revolucia registaro”.

Inter la subskribintoj estas, interalie, eksprezidantoj Dilma Roussef (Brazilo), Rafael Correa (Ekvadoro), José Manuel Zelaya (Honduro) kaj Ernesto Samper (Kolombio), la Nobel-premio pri paco Adolfo Pérez Esquivel, filozofoj kiel Gianni Vattimo kaj Fernando Buen Abad, la brazila kantisto Chico Buarque kaj la teologo Leonardo Boff.

La deklaron subskribis anka? dekoj da ministroj, deputitoj, senatanoj kaj diplomatoj el diversaj e?ropaj kaj latin-amerikaj landoj, kaj anka? ?urnalistoj, akademianoj, juristoj, verkistoj, artistoj, filmistoj kaj anka? el la mondo de la sporto kiel César Luis Menotti, iama trejnisto de la futbalteamo el Argentino.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/276702-pli-ol-200-personecoj-tra-la-mondo-denuncas-subfosajn-agojn-de-usono-en-kubo

Radio Habana Cuba